The
British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

Vol. XXXVI, No. 521/522 SEPTEMBER/OCTOBER, 1948

ESPERANTO IN THE SECONDARY MODERN SCHOOL

The following article (in somewhat longer form) was contributed by a Training College Student to his College magazine. Students in other colleges might well do likewise; and, if interest is aroused, suggest a lecture in the college to follow up.—ED.

The anachronism of a twentieth-century civilization without a common language cannot last much longer. Technical developments have made the world a very small unit. But it still consists of some sixty nation states, all concerned to maintain their own interests; and their peoples' lives are influenced accordingly. Yet if a third World War comes, this will be not because the peoples of the world desire it, but (at least in part) because they are ignorant of one another, victims of a limited environment, and with no defence against the follies of their leaders. It is therefore reasonable to believe that the universal adoption of a common language would help to avert this disaster. Here is a matter which we, as future teachers, may not and cannot ignore, if we are to play our rightful part.

In his introductory lecture to the Modern Languages Department, Mr. O. said that we should help children to realize that they are citizens, not of one country only, but also of the world, and this we could do by arousing a sympathetic interest in *one* other nation, through a study of its language. Now at school I did French for five years. It happens to be the subject that I most enjoyed. Yet I do not feel that it very much enlarged my horizon. French is undoubtedly worth learning for its own sake, especially if one has a linguistic bent. But I greatly question whether it is the best means of achieving the aim described above. And especially is this doubtful in the Secondary Modern School, where only a few are capable of gaining more than a superficial knowledge of it.

Now what happens in a school where Esperanto is taught? Let us note, first, that Esperanto is well within the children's powers: they can use it with ease and confidence before they leave school, and they have really mastered something that will be a lifelong asset to them. Again, I know from personal experience, that if the teacher is competent there is no lesson more enjoyable to children and to teacher alike, than the Esperanto lesson. The children absorb the language almost without realizing that they are going through a learning process. They have a strong incentive, too, for they know that when they have made some progress they will correspond with other children—not only in France or in Germany, but all over the world. At first, perhaps, the stamp-collecting motive will be to the fore. But gradually the children gain increasing delight in the content of the letters and postcards that they receive, and learn much from them. Early letters, of course, are "vetted" to ensure a sufficiently high standard. Incoming letters of outstanding interest are read out to the class and by the class, and are displayed on a wall-sheet.

Moreover, the international language becomes a co-ordinating activity in the life of the school. Abstractions about world-citizenship mean little to children of 11–15. But Jack, of Bethnal Green, who receives interesting and friendly letters (maybe little gifts, too) from Giordano, in Argentina, Karoly, in Hungary, Hans, in Germany, Niels, in Iceland, and Manuel, in Portugal, is not likely to grow up with an insular outlook. Geography comes to life, as a subject full of human interest, dealing with real people living in real places.

Esperanto Youth Camps, held annually in various countries, enable the Esperantist teacher to give some of his pupils the invaluable experience of communal life in a

truly international atmosphere. There is none of the embarrassment due to language difficulties normally experienced in such adolescent assemblies : the others are not "foreigners", but "fellow-Esperantists".

I ask you to examine with an open mind whatever you may hear and read on this subject—yes, and that includes this article ! I come across the most foolish statements by people who should know better than to treat such an important subject at second-hand. No true scientist would dream of stating a conclusion without testing it by searching practical experiment. Yet apparently intelligent people are ready to pass judgment on Esperanto when they have little acquaintance with it, or even none whatever. Learn the language, and put it to the test in an international Esperanto Congress : live for a week in a community of nations unhampered by the language barrier. Believe me, this is a wonderful experience.

I conclude with a few questions.

(1) Can we hope to achieve anything approaching a federated world, and dissolve suspicion and mistrust, unless we have an international auxiliary language ?

(2) Do not the inherent difficulties of any national language, English included, not to mention the national prejudices involved, militate against its universal adoption ?

(3) Is not a "national international" language a contradiction in terms, anyway ?

(4) Seeing that the majority of people in this busy world have neither time nor ability to master another national tongue, ought we not to work for the universal adoption of a *neutral* language, sufficiently simple for *all* to learn, yet satisfying all requirements ?

Esperanto is the solution of the problem. And we are for too slow to realize this.

L. GORDON WATSON

LA SOUTHPORTA KONGRESO, 1948 FINANCA RAPORTO

Enzpezoj : Aliĝoj, £72 ; Donacoj, £14–8–6 ; Sume, £86–8–6.

Elspezoj : Presaĵoj, biletoj, insignoj, £22–3–11 ; Poŝto, £5–3–2 ; Reklamoj, £4 ; Intendantoj, muzikistoj, k.a., £8–9–0; Floroj, £2–13–0 ; Diversaĵoj, 16/1. Sume, £43–5–2.

Profito : £43–3–4. Do ne necesis preni monon el la Garantia Kaso (£18–3–6).

La Kongresa Komitato fordonacis la profiton jene : B.E.A. Ĝenerala Kaso, £20 ; Lancs. kaj Ches. Federacio, £10; Southporta Grupo, £13–3–4.

Koran Gratulon—kaj Sinceran Dankon !

INTERNACIA VILAĜO

En la kantono de St. Gallen, Svisujo, troviĝas malgranda urbo nomita Trogen. Apud ĉi tiu urbeto nun konstruiĝas internacia vilaĝo por infanoj, la sola tia en la mondo. La iniciatinto estis Svisa redaktoro, Doktoro Corti, kiu antaŭ kelke da jaroj multe suferis pro danĝera malsano. Nur per ama flegado kaj zorgo li resaniĝis. Por esprimi sian dankon li tuj komencis dediĉi tempon kaj rimedojn por doni helpon al tiuj, kiuj plej multe bezonis ĝin. Tiuj, laŭ li, estis la infanoj, viktimoj de la milito. Jen tipa ekzemplo.

Vladimir havis naŭ jarojn, sed lia vizaĝo estis tiel sama, kiel tiu de plenaĝulo, kaj malmola kiel ŝtalo. Tamen lia korpo estis malgrasa kaj laca. Sed liaj pensoj estis akraj, kaj li turnis ilin suspekteme al ĉiuj. Li neniam havis hejmon. Same kiel miloj da Eŭropaj infanoj, li perdis ĉion, kiam la milito venis al lia urbo : patron, patrinon, parencojn, eĉ bonvolemajn fremdulojn kiuj provis prizorgi la bebon Vladimir antaŭ ok jaroj en Varsovio.

Kiam Vladimir kun aliaj Polaj geknaboj estis sendita al Svisujo, li ne povis kredi, ke aferoj estos pli bonaj. Dum sia tuta vivo li estis migrigita de loko al loko. Eĉ kiam li kaj liaj kunuloj ricevis grandan domon tute por si mem, Vladimir rifuzis malpaki sian etan pakajon. "Kiel utilos ?" li diris, "ni devos migri denove."

Sed ĉi tiu loko vere estis malsama. Ĝi estis la Vilaĝo por Infanoj, konstruita por nur unu celo ; doni novan vivon al infanoj kiaj Vladimir. Ĝi estis sonĝvilaĝo, en loko kie la suno daŭre brilas ; kie troviĝas freŝaj ovoj, lakto, fruktoj kaj viando ; kie Vladimir povas ludi kun aliaj infanoj el Francujo, Italujo, kaj aliaj landoj. Ĝi estis loko, kie li povas havi lecionojn pri la piano kaj violono, aŭ kie li povas iri en la subteran laborejon de sia propra domo kaj fari multajn amuzajojn—fajfilon kiu vere povas doni muzikon, glitveturilon por la vintraj sportoj.

Fine Vladimir akceptis en la kapon la ideon, ke ĉi tiu estas daŭra hejmo. Ĉi tie li restos, ĝis (post ses aŭ sep jaroj) li estos preta reiri al Polujo, sufiĉe edukita por perlabori siajn vivrimedojn.

Laŭ iuj vidpunktoj ĉi tiu infanvilaĝo estis kurioza loko. Svisaj amikoj vizitis ĝin kaj ĝenerale postlasis donacojn, ĉokoladon, sukeraĵon, ĝis amasiĝis granda kvanto. Ĉi tion oni metis en ŝrankon, kiu ĉiam restis neŝlosita. Tio malkontentigis Vladimir. Li ne estis malbona knabo. Sed li ĉiam devis havigi siajn vivrimedojn per ruzemo, kaj en tagoj forpasintaj li konstatis, ke se li ne ŝtelos manĝaĵojn kiam ajn li povos, li nepre

suferos pro malsato. Do li iris al la instruisto loĝanta en la Pola domo.

"Ni ne povas lasi la sukeraĵon negardita," li diris, "aŭ iu nepre ŝtelos ĝin." La instruisto ne opiniis tion. Li diris, "Vladimir, tiu sukeraĵo apartenas al ni ĉiuj, kune. Kiam ajn ni volas, ni povos dividi ĝin." Vladimir ne estis kontenta. "Ne!" li insistis. "Se ni ne ŝlosos la ŝrankon,iu certe ŝtelos ĝin." Tamen oni ne ŝlosis ĝin, kaj iel neniom el la sukeraĵo malaperis. Tio estis tute nova travivaĵo por Vladimir, kaj ĝi forte impresis lin. Iom post iom lia suspektemo cedis lokon al fido en la homoj ĉirkaŭ li.

La estroj de la vilaĝo havas unu fundamentan ideon—doni al geknaboj sekurecon kaj bonvolemon. Kiam venis al la vilaĝo la Germanaj geknaboj, ili vidis ĉion nova kaj pura, kaj ili demandis, "Kiam oni bombis la malnovajn domojn?"

Nun staras domoj, en kiuj loĝas grupoj el Hungarujo, Polujo, Francujo, Germanujo, Aŭstrujo. Baldaŭ estos pretaj domoj por aliaj el Italujo, Grekujo kaj liaj landoj. En ĉiu domo loĝas instruisto aŭ gvidisto parolanta la lingvon de la domgrupo. La manĝojn oni preparas laŭ la kutimo de la landgrupo, tiel ke la geknaboj povu pli facile alkutimiĝi al lokaj kondiĉoj, kiam ili reiros al la patrolando. Ĉiuj trovas grandan intereson en la kunesto de alilandaj geknaboj. En sportoj, muziko, kaj aparte en la fabrikado de aĵoj en la fabrikejoj, ili trovas kamaradecon. Neniu infano estos resendita al sia patrolando, ĝis li aŭ ŝi havos sekurecon en la loko kie ĝi loĝos. "Neniu el ĉi tiuj infanoj" diris unu el la vilaĝestroj "estos permesata denove sin senti nesekura, se ni povos tion malebligi."

F. PARKER

El *The Worker Esperantist*

PAPILIO

Multkolora papilio,
Sunnaskita ĝuemulo,
Vi trinkadas la mielon
El la floroj sen skrupulo.
Kun feliĉo en la koro
Flugas vi de flor' al floro;
Via tuta vivovoj'
Estas kvazaŭ ĉen' de ĝoj'!

Uzu do, vi gajemulo,
Vian vivon dum somero.
Ĝuu ĉiun ajn plezuron
Kaj belecon sur la tero!
Kara eta papilio!
Iom kaptas min envio.
Ha! volonte ankaŭ mi
Estus eta papili'!

FRIEDRICH HAHN, Bremen.

LOCAL NEWS

Andover—*Meetings:* Free Library, Bridge St., Tues., 6.30. Visitors and intending students invited.

Birmingham and District—*Meetings:* 3.15, 18 Sept., at 83 Suffolk St., Cseh Lesson. 16 Oct., at 26 Bristol Rd., Congress Reports.

Glasgow—*Meetings*: Mon., 7.30, Picture House Café, Renfield St. *From* 4 *Oct.* at Highlanders' Institute, Elmbank St.

Gosport, Cosham—Lectures by Mr. E. Long.

Huddersfield—Summer programme items: Garden Party, Surpriza Vespero, Vagado kun Halifax.

Ipswich—The Cooperative Youth Club class has 34 students. Eight visited the TJO camp in Groet. The local Cooperative Education Committee gave assistance, and prizes for the best reports.

London Esperanto Club—Fri., 7.0, at 153 Drummond St., N.W.1. Visitors welcome. Sept. 17, Ĉu pacifismo sufiĉas? 24 Librorecenzoj. Oct. 1 Teatra vespero. 8 Someraj lernejoj. 15 Koloniaj insuloj. 22 Lumbildoj. 29 Socikredito. Nov. 5. Popoldancoj (1/-).

London, E.17. Walthamstow Educational Settlement, Greenleaf Rd. *Classes*: 7.30 (10/-): *Elem.*, Thurs. *Int.*, Wed. *Start* Sept. 30, 29.

London, N.22—*Classes* (A. W. Rowe): *Elem.*, Tues. *Int.*, Thurs. 7.0. Glendale Institute, Wood Green. *Demonstration* 21 Sept.

London, N.W.1—Starting Sept. 17, classes will be held as under at Marylebone Literary Institute, 248 Marylebone Rd. *Bus*: 1, 18, 23 or 27. *Stations:* Edgware Rd., Marylebone, Baker St. *Fee:* 7/6 for three terms. *General:* Mon., 6.30; Tues., 6.15; Wed., 6.30. *Int.:* Mon., 7.0. *Conversation:* Tues., 6.30. *Post-Elementary:* Thurs., 6.30. *Advanced:* Thurs., 7.0.

London. Divine Service in Esperanto—3.15, St. Barnabas Church, Pimlico Road., S.W.1, on 12 Sept., Rev. V. H. P. Hayman, D.D., and 10 Oct. R. Murray. **Liberal Christian Service**—3.0, Unitarian Church, West Ham Lane, E.15; 26 Sept., 24 Oct.

Manchester and District—*Meetings:* 49 Lower Mosley St., 2.30: 25 Sept., El la ĉapelo. 30 Oct., En Belsen-koncentrejo.

Newcastle-on-Tyne—*Classes:* Tues., 7.0, at 33 Summerhill St., Newcastle 4. Start: 14 Sept., 10/-.

Nottingham—Three official classes, three unofficial classes. Congratulations.

Watford—*Conversation Circle:* Tues., 7.0 at 9 Market St. *Classes: Elem.:* from 24 Sept.; Fri., 7.0. *Int.:* Tues., 7.0. Both at Alexandra School.

NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A., others from the addresses given.

Ni Devas Diri Ĝin—*Hermann Wagner. Eldonis Kultur-Aufbau-Verlag, Brucknerstr. 12, Stuttgart-Bothang.*

Ĉi tio estas la unua Esperanta verko el Germanujo post la milito, kaj pro tio ĝi meritas atenton. Ĝi konsistas el serio de konferencaj paroladoj kaj leteroj de nia Germana samideano, kaj enhavas elkoran pledon kontraŭ la doktrino de la kolektiva kulpo de la Germana popolo. La aŭtoro priskribas la luktojn kaj suferojn de la Germanaj kontraŭfaŝistoj ; iliajn sopirojn al libereco ; kaj ilian nunan ĉagrenon, kiam oni traktas ilin kiel kunkrimulojn.

La sinteno de la Esperanta movado rilate la Germanajn samideanojn estas problemo aktuala kaj grava, pri kiu la libro estas utila kontribuo.

Bedaŭrinde la legadon malfaciligas la malgrandeco de la presliteroj, la multaj mallongigoj, la "SAT"-aĵoj, kaj la peza maleleganta stilo. Precipe ĝenis min longaj adjektivaj frazeroj. Ekzemple : *Mi jam perdis . . . mian malgraŭ la sennombraj aviadilaj atakoj dum la milito feliĉe preskaŭ savitan loĝejon.*

J. FARRAND

***Morto de Trajno**—*Freeman Wills Crofts. Trad. Mason Stuttard.* 256*pp.*, 9*s.*, *afr.* 6*p.*

Ne, la "Trajno" de la titolo ne estas mispresita "Trajano". Temas ne pri morto de homo sed pri morto de vagonaro. La personigo de vagonaro estas stranga eĉ al Anglaj okuloj, sed ĝi certe faras trafan titolon. Estas bedaŭrinde nur, ke la tradukinto uzis la neoficialan radikon "trajno" anstataŭ la tute samsenca "vagonaro". Vagonaro estas vorto, kiu por la plimulto de siaj uzantoj bildigas aron da vagonoj plus lokomotivo. "Trajno" ne aldonas plian nuancon al tiu bildo.

La verkinto de la Angla originalo estas sufiĉe fama ne nur en Anglujo sed ankaŭ alilande. Liaj kriminalaj romanoj estas tradukitaj en plurajn lingvojn. Li estas multjara Esperantisto, kaj ĉeestis internaciajn kongresojn en Antverpeno, Berno, kaj Barcelono. Ne necesas do priparoli lian talenton.

Sufiĉe multaj jaroj kutime pasas, antaŭ ol nacilingva romano estas tradukita en Esperanton. Sed la originalo de ĉi tiu verko aperis antaŭ nur nelonge. Ĝia medio estas Anglujo en 1942, kaj la milito komprenеble estas fono de la rakonto.

La unua duono de la libro ne estas tiel rapidmova kiel la plimulto de kriminalaj remanoj. Ĝi havas du partojn. Unue oni legas detalan priskribon pri kunsido de Brita ministraro, kaj de la ĉeno de oficistoj kies manoj plenumas la ordonojn de tiu ministraro. Tio donas imponan impreson pri la tuta ŝtato organizata por moderna milito, kaj pri la ĝenoj kaj plendoj de la individuoj, kiuj formas la raddentojn en la grandega maŝino. Poste oni detale priskribas fervojan akcidenton kaj la sekvintan enketon. Ĉi tiu parto havas la guston de oficiala raporto. La granda nombro da propraj nomoj estas malfacile memoreblaj eĉ por Anglo, kaj alilandano verŝajne trovos ilin eĉ pli forglitemaj. Tamen laŭ lingva vidpunkto ĉi tiu unua duono de la libro estas utila kaj pensiga. La bonega traduko de Mason Stuttard riĉigos la teknikan vortprovizon de ĉiu Esperantisto. En si mem ĝi formas fervojan terminaron.

En la dua parto de la libro la enketo pasas el la manoj de teknikaj ekspertizistoj en la manojn de la kriminala polico. La atmosfero ŝanĝiĝas. La intrigo estas akcelata. Okazaĵoj rapide sinsekvas. Detektivo riskas sian vivon. La lando estas savita. La milito estas gajnota.

Lingve la stilo de la traduko estas tre bona kaj tute taŭga, kaj por la teknikaj priskriboj kaj por la ekscitaj pecoj. Sola difekto estas la stranga uzo de komoj. La sistemo de interpunkcio estas nek Zamenhofa nek Angla. Ĝi estas nek tiu de la Plena Gramatiko, nek tiu uzata de Stellan Engholm. Ĝi ŝajnas tute kaprica. Oni trovas komojn, kie paŭzeto en parolado ne okazus ; kaj la manko de komo ĝenas, kie oni nature bezonas komon. Du ekzemploj sufiĉas por montri la malbonecon de neklara interpunkcio : *"Tuj kiam ni ricevos informon el Exeter vi, Hudson aranĝu pri la aeroplano"* (153). *"Ne efektive oni kolektis ĝin"* (219).

Preseraroj estas malmultaj, sed du estas konfuzaj : *nevenkinte* anstataŭ "nevekinte" (110), kaj *sin prenis* anstataŭ sin premis (252). Gramatikaj eraroj estas *kirligis* (53), *"tio estus malsaĝe"* (87), kaj *antaŭ li sin registris* (99).

Radiolokalizado estas ĝusta sed tro longa traduko de la angla *radar*. Eble *radao*, *radai* pruviĝus akceptinda neologismo.

Estas interese rimarki, ke S-ro Stuttard preferas *alesti* ol *ĉeesti* (86,213).

E. P. OCKEY

La 31a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj, Jambol, 23-28 Aŭg., 1948. 24pp. Programo, kaj priskribo de la urbo.

***Vivo de Pissarro**—En la serio "Enkonduko en la Kulturon". Ludovic-Rodo. 28pp., 9p., afr. 1p. Kun naŭ bildoj, portreto, kaj bibliografio.

Aŭtuna Foiro de Budapeŝto, 3–13 Septembro, 1948—Tre bela murafiŝo. **Budapeŝto.** Fremdultrafika Oficejo de Budapest, Deák Ferenc-u 2, Budapest V, Hungarujo. Tre bela 16-paĝa gvidlibreto en Esperanto, riĉe ilustrita. La Oficejo volonte liveros informojn pri loĝejoj, k.s. Similan 20-paĝan libron **Banejurbo Budapeŝto** eldonis Centra Komitato de Banejoj kaj Resanigejoj, Molotov-Ter 3, Budapest-V, kun plenaj informoj pri banejoj, fontoj, sanigejoj.

Ni gratulas la Budapeŝtajn samideanojn, kaj esperas, ke ili rikoltos multe da vizitantoj.

Prospekto de la Filmstrioj—*36-paĝa libreto, havebla senpage (sed po nur unu ekz) ĉe Esperanta Film-Grupo, Antwerpsestraat 45, Bergen-op-Zoom, Nederlando.*

Jam kelkajn fojojn ni priparolis ĉi tiun serion da filmbendoj (filmstrioj). Ĉiu bendo (larĝeco 35mm) konsistas el 30–1000 bildoj (19 x 24mm), por prezento en ĉambro aŭ salono. Pri ĉiu bildo estas klariga teksto en Esperanto. Ĉiu titolo provizas tre interesan kaj instruan unuhoran programon al grupoj, societoj, aŭ kursoj, kondiĉe ke ili disponas konvenan projekciilon. La tekstoj mem estas en modela Esperanto. Ni povas varme rekomendi ĉi tiun kuraĝan kaj subtenindan entreprenon al niaj grupoj. Plenaj detaloj troviĝas en la "Prospekto". Ni donas la prezon en ŝilingoj kaj pencoj por filmbendo kaj teksto kune : ili ne estas aĉeteblaj aparte. Jam aperis jenaj titoloj (multaj aliaj estas en preparo) :

Antikva Grekujo, 13/9 ; *Inter la Araboj* 10/7 ; *Lando kaj popolo de Siamo*, 12/7 ; *Javo kaj Indonezio I*, 12/5, *II*, 13/4 ; *Kun Sven Hedin al Transhimalajo*, 16/3 ; *Sovaĝaj bestoj de Afriko*, 13/8 ; *La vizaĝo de la Terglobo*, 14/8 ; *Meksikio*, 13/3 ; *Marvojaĝo al Indonezio*, 15/– ; *La Mirinda Nilolando*, 16/8 ; *Borneo laŭ bildoj*, 16/3 ; *Zelando*, 9/– ; *Palestino Norda*, 14/4; *Palestino Suda*, 13/3.

Sendu *mendojn* (ne monon) al la Filmgrupo en Nederlando : sendu *monon* (*ne mendojn*) al UEA., Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

Maŝinoj. Mono, kaj Mondpaco. Socikreditano parolas. Ni ricevis pluajn kajerojn de ĉi tiu verko (sekciojn 31–39). La tutan verkon sendos senpage laŭ peto *Social Credit Centre, Gordon House, Carrington St., Nottingham.*

S-ro J. W. Leslie, kiu bonege tradukis la ĝisnunajn ĉapitrojn, deklaras, ke de nun li ĉesos kunlabori en la traduko, ĉar la aŭtoro volas altrudi en ĝin ion nekonforman al la fundamentaj principoj de Socikredito difinitaj de Douglas.

Statistika Resumo de Brazilo, 1946—*267pp., Eldonita de Instituto Brazila de Geografio kaj Statistiko, en lingvoj Portugala, Esperanta, kaj Angla. Prezo ne montrita.*

Ĉi tiu lasta Esperanta eldonaĵo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko estas dokumento tre atentinda, ekzemplo de serioza oficiala uzo de Esperanto fare de grava nacia Instituto. Ĝi estas dense sed klare presita, kaj liveras tre detalan statistikaron pri Brazilo—loĝantaro ; sanstato ; geografio ; fizika situacio ; stato kaj movado de la loĝantaro ; produktaĵoj mineralaj, agrikulturaj, kaj industriaj ; transporto ; komunikado ; financo ; komerco ; socia servaro ; edukado ; k.m.a. (sole pri religiaj konfesoj ni trovis nenion). La Esperanta traduko estas vere bonega, kaj liveras modelon por ĉiu simila verko.

Ni kore gratulas la Instituton pri la eldono de ĉi tiu dua Statistika Resumo (la unua aperis en 1940), kaj varme esperas, ke ĝia bonega ekzemplo trovos multajn imitantojn ĉe aliaj registaroj.

Skizoj pri Nederlando—*Karel Ĉapek. Elĉeĥigis G. J. Degenkamp.* 96 *pp. Prezo anoncota.*

Jen ĝenerale bonega traduko de fama literaturaĵo, kun la originalaj geniaj skizoj faritaj de la aŭtoro, kiuj mem estas regalo por la okuloj. Estus impertinente kaj senutile laŭdi aŭ recenzi tian faman klasikaĵon. Ĝia apero en Esperanto estas afero tre gratulinda, kaj ni povas ĝin rekomendi.

Kritikindaĵoj preskaŭ mankas. Ni notas *Anglio Francio* (Korektu : *Anglujo, Francujo*). *Hollando, klasicismo* (ĉu ne *Holando, klasikismo* ?).

Korektu ankaŭ : Oni vidas nenion *krom fenestrojn kaj larĝajn pordojn* (forigu la akuzativon); *Sibirio* (*Siberio*); la *nura* (*sola*) diferenco; *Indio* (*Hindujo* : *Indiano* ne estas *hindo*.

Interesaj esprimoj : *mangrando; sepvosta kato* (cat and nine taile) ; *karekso* (carex : sedge), cp. *kariko* (carica, papaw tree) ; *aŭtopedo* (scooter) ("Infanluda Terminaro" donas *skutilo*) ; *etmajstroj, etskala. Fibo* : ni ne sukcesis traduki. *Aliso*=alyssum, madwort ; *amofilo*=sea-reed ; matweed.

La Internacia Asocio de Poŝtmarkkolektantoj. Kio ? Kial ? Kiel ?—16-paĝa klariga broŝuro, alloge presita, kun ĉiaj informoj. Petu ekzempleron ĉe XPDO domo, Didcot, Berks. Ĝi certe donos al vi intereson pri entrepreno tre subteninda.

Vizitu la Altajn Tatrojn—La Altaj Tatroj estas la plej alta montegaro en la Nordaj Karpatoj (49°–49°20 N x 19° 55–20°25 E). Jen priskribo, kun 14 ilustraĵoj. Petu ekzempleron ĉe *Stefan Toth, Svit, Altaj Tatroj, Slovakujo, Czechlovakia.*

***Konciza Kompendio por ludi la Klavaron** per **Klavarskribo**—*16pp., 3ŝ., afr. 2p.*

Jen gvidlibro en Esperanto por la lernado de genia sistemo de muzika notacio kiu havas Esperantan nomon: "Klavarskribo".

Antaŭ proksimume 15 jaroj, Cornelius Pot, Nederlanda sciencisto kun pasio por muziko, elpensis novan sistemon de muzika notacio, kiu forigas kelkajn el la malfacilaĵoj kaj komplikaĵoj, kiuj ofte senkuraĝigas la lernanton de la piano per la malnova notacio.

La sukceso de la metodo iris de lando al lando, kaj nur la postmilitaj malfacilaĵoj (ekz, papermanko) malhelpis ĝian pli rapidan disvastiĝon. Nun, kuraĝigite de ĉiam pli granda aro de diversnaciaj uzantoj, la eldonisto, mem fervora Esperantisto, decidis aperigi ĉi tiun lernolibron en Esperanto. Per ĝi la jam senkuraĝiĝinto aŭ la nova aspiranto povas eklerni, kaj je sia surprizo tuj provi kaj reprodukti jam konatajn ariojn.

Troviĝas pli ol 10,000 diversaj muzikaĵoj en la klavara sistemo. Katalogojn kaj pluajn informojn oni povas ricevi el Klavarskriba Instituto, 10a HighburyPlace, London, N.5.

Sendube la libro trovos bonan akcepton ĉe la Esperantistoj muzikemaj. Aparta paĝo en la libro liveras la muzikon de "La Espero".

C. P. COCKS

Urbo São Paulo—Bela 48-paĝa libro, kun 45 tutpaĝaj bildoj kaj priskriba teksto pri la vidindaĵoj de tiu Brazila ĉefurbo. Oni jam eldonis similan verkon pri Salvador, kaj esperas aldoni pluajn al la serio. La verko estas oficiala eldonaĵo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. *Brazila Ligo Esperantista, Praca da Republica* 54, *Rio de Janejro*, sendos ekzempleron al ĉiu petinto, kiu kunsendos 10 rk.

***Kantareto: Ĉeĥoslovakaj Popolkantoj,** *kun muziko de la arioj. Jan kaj Karel Filip.* 63*pp., dua eldono, pligrandigita,* 1948 (*la unua eldono aperis en* 1929). 5s. 3p., *afr. 2p.*

Ni kore bonvenigas ĉi tiun plaĉaspektan kantaron. Ĝi enhavas 60 popolkantojn, kaj sendube tre helpos gajigi Esperantajn kunvenojn en Ĉeĥoslovakujo. Oni ne atendas trovi en popolkantaro poezion altgradan. Sed oni povas almenaŭ diri, ke ĉi tiu verko ne estas difektita de la eraroj kaj krudaĵoj. kiuj tro ofte makulas niajn kantarojn: oni povas kanti la pecojn facile kaj ĝue. "La Espero" en tonalo Bb estas tro alta por ordinara voĉo: pli bone estus presi ĝin en Ab aŭ eĉ G.

Scienco kaj Tekniko—*Oficiala organo de Brita Esperanta Scienca Asocio. Por nemembroj, po* 1ŝ *3p., ĉe la Sek., E. D. Durrant,* 18 *Romeyn Rd., London, S.W.*16. *Membrokotizo 5ŝ.*

La unua numero enhavas jenajn artikolojn—kiom laiko povas juĝi: tre bonajn. *La Rolo de BESA* (J. C. Flugel); *La Nombro kaj Distribuo de la Homaro* (C. B. Fawcett); *Vegetaĵaj Hormonoj* (Georges Clauzade); *La Grandskala Sintezo de Izooktano* (C. M. Houghton); *La Solvado de Ekvacioj kaj la Kalkulado de Radikoj* (C. M. Bean). Oni invitas seriozajn kaj kompetentajn originalaĵojn. Ni deziras al BESA kaj al ĝia organo plenan sukceson.

Deutsch-Esperanto Taschenwörterbuch (Dua eldono, reviziita). J. Künnel, Wulffsblöcken 36, (24a)Hamburg-La., I., Germanujo.

192-paĝa poŝvortaro, Prezo ne montrita. Kiom ni povas juĝi, ĝi estas tre bona. Papero neluksa: tamen ke la aŭtoro eldonu ion ajn en la nunaj cirkonstancoj estas mem triumfo. Ni gratulas lin, kaj deziras por la verko grandan disvendon.

EDZIĜO

Curtis-Farley—Je 2 Aŭgusto, ĉe la Kvakera Kunvenejo, Broad Weir, niaj Bristolaj samideanoj Frank Curtis kaj Nina Farley.

MORTOJ

Grimmitt—Je 27 Junio, Vincent Grimmitt, 80-jara, fervora samideano, kaj membro de 1922.

Grugeon—Je 28 Junio, Charles R. Grugeon, 59-jara, Delegito por Henley-on-Thames, Vicprez. de Reading Esperanto Society. Edukisto, Psikologo, Filantropo, li multe laboris por la bono de la homaro.

Guéritte—Je 29 Junio, pro kormalsano, Madeleine T. Guéritte, 66-jara, la edzino de nia samideano T. J. Guéritte en Surbiton. S-ino Guéritte estis konata literaturisto, kaj tradukis Francen multe da valoraj verkoj. Dum 20 jaroj ŝi estris la Francan Grupon "La Nouvelle Education", kie ŝi efike propagandis nian lingvon.

Leverton—Je 15 Aŭgusto, C. A. P. Leverton, 73-jara, pioniro de la grupo en Nottingham.

Mackenzie—Je 18 Major, Clarence V. Mackenzie, Halesowen, 59-jara, de 1920 ĝis 1946 estro de Dudley Grammar School, kie li lastatempe instruis Esperantan kurson.

Muir—En Aŭgusto, John Muir, J.P., Prezidento de Dundee Esperanto Group.

FIRST LESSONS TO ELEMENTARY SCHOOLCHILDREN

I am often asked for an outline of a few first lessons to children, such as I should give to a school class. So here it is. I hope it may be helpful. But headings can no more reproduce a lesson than a skeleton represent the human form. Unless the teacher knows how to "put it over" the printed page will be of little use. See the hints on teaching given in B.E. (May 1943–*June* 1945).

This introductory course has been tried out in a score of elementary schools with surprising results. A class of average children—even dull ones—will in five lessons lap up as much as is here given, and thus absorb the first elements of conversation. But it is an outline only. The expert teacher will know (what the tyro does not know) that every other line calls for suitable actions, objects to look at, anecdotes, jokes, examples, blackboard pictures and diagrams, and oral exercises, to give the lesson life and keep the children interested. These things cannot be put in print. And the expert teacher will not need the outline, anyway : for he will (of course) have a far better plan of his own.

Mi ŝi li vi ĝi (*Point*)
Mi estas (*name*)
Ŝi (li) estas . . .
Kiu estas li ? Ŝi ? Li estas . . .

Kio estas ĝi ? Kio ĝi estas ?
seĝo planko tablo piano lampo

La seĝo . . .
Ĝi estas la planko . . .
muro pordo fenestro plafono benko
nigra tabulo, bildo vazo pupitro mapo
(*objects in the room*)

Kio ? . . . **o.** Kio estas **tio ?**
Tio estas . . .

Kie estas . . . ?
Li (ĝi) estas **tie** (*point*)

knab-(kat-sinjor-instruist-)o, -ino
La knabo **kaj** la knabino.
La kat-(aligator-hipopotam-)o kaj . . .

S-ro B kaj **S-ino** B kaj **F-ino** B

Kiu (Kio) estas **en** la **ĉambro ?**

staras, sidas.
sur la tablo (seĝo, planko).
Li staras sur la seĝo . . . tablo . . . planko.

Ĉu li estas Tom ? **Jes,** li estas Tom
Ne, li **ne** estas Tom
Ĉu li staras ?
Ne, li ne staras, li sidas.
Ĉu mi estas Flossie ?
Sur kio li sidas ?
Ĉu Mary estas knabo ?

(Kio estas tio ?) **Valizo.**
Kie la valizo estas ?
(Ĝi estas tie, sur la tablo).

Kio estas en la valizo ?
Kat-o, -ino, **-ido.** Hund-o, -ino, -ido

Unu -o kaj unu -o estas **du -oj.**
Du -oj kaj unu -o estas **tri** -oj.

La muroj (fenestroj, lampoj) estas tie kaj tie kaj tie (*point*).

Kato kaj hundo estas **bestoj.**
Knabo kaj knabino estas **infanoj.**

Venu al mi ! (Kaj vi ! Kaj vi !)
Unu knabo kaj du knabinoj estas tri . . .

kuŝas, falas. Ĉu li kuŝas ?
Kion . . . faras ? (What am, is, are . . . doing) ?
Mi (vi, ŝi) sidas . . .
Ĉu . . . sidas **aŭ** staras ?

Ni (ili) estas infanoj—**lernantoj.**
Kio estas ili ? . . . (bestoj).

Star**u !** Sid**u !** Kuŝ**u !**
Kion vi faras ? (Ni sidas).
Ĉu ili sidas ?
Ne, ili ne sidas, ili staras.

Tiu knabo staras, kaj tiu knabo sidas.
Kio estas sur tiu tablo (muro) ?

Salutoj. Respondoj.
Bonan matenon, F-ino G.
Bonan **tag-(vesper-nokt-)on,** Jean !

Dankon, sinjoro. **Same al vi !**
Ĝis la revido, S-ino M

Kompren-(leg-lern-parol-silent-skrib-)as.
Mi (vi, li, ili) . . . as
La instruisto skribas, la lernantoj legas
. . . parolas, . . . silentas.
. . . **demandas, sed** . . . ne respondas.

Leg-(respond-skrib-silent-)**u !**
Venu al mi ! (Mi venas).

Ne parol-(respond-silent-kuŝ-)**u !**

Skribu sur la nigra tabulo.
Kion li (ŝi) faras ? Li . . .

Diru al mi : Kiu . . . ? Kio . . . ? Ĉu . . . ?
Diru al mi, **mi petas,** kion . . . faras ?
Mia tre kara S-ro B, mi **tre** petas, parolu, kaj diru al mi . . .

Mia edzino.
Kiu ŝi estas ? (Ŝi estas S-ino B).
Ŝi **loĝas** en . . . Kaj mi !
Kie vi (li, ŝi, mi) loĝas ?

Mia edzino estas **bela.** **Tre** bela.
Kion ŝi havas? (*Guess the meaning*)
Unu buŝo (nazo)!
Du lip-(okul-orel-man-pied-har-)oj!
Ŝi estas tre tre bela!

Kiu estas **lia** edzino? **ŝia** edzo?
Kiu estas mia edzino? (**Via** edzino . . .)
Ĉu tiu -o estas via? (lia? ŝia? mia?)

Sako. Kio estas en la sako?
(*Eight bags.* "En la sako estas **alia** sako" . . . *in the eighth:* sak**et**o).

Kio estas en la saketo?
Muso! Infan**et**o! Ĉokolado!
(Mistero! Sekreto!) Ŝminko!

Hund-(kat-sid-leg-skrib-kuŝ-lern-loĝ-)**ejo**

Kie la kato (kundo) loĝas?

(*Read "Esperanto for Beginners"*, pars 1–5, *using* -in, -ejo, -et, -id, *with roots* in *par.* 1).

(17 **glasoj** *of various colours*)
Glaso kaj glaso kaj glaso kaj . . . **glaseto!**

nigra bruna ruĝa oranĝa flava verda
blua griza blanka krema roza ora
arĝenta nuba stria makula makuleta

Tiu glaso estas . . . . **-a**
-a . . . **-o,** Blanka glaso.
Kia**?** Blua.

Kia estas la **koloro de** tiu glaso?
La koloro de tiu glaso estas **-a**.

